

# MAGAZINO

★ Organo de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj ★  
 Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete - Membro de LEA-Komitato de S.A.T., Paris



**LOKIGA  
 NEŬTRALA  
 FACILA**



L. L. Zamenhof en 1875

>Kreinto de la internacia lingvo Esperanto<

**Ludoviko Lazaro Zamenhof**  
 (1859 - 1917)

## MIA PENSO

*Sur la kampo, for de l'mondo,  
 antaŭ nokto de somero,  
 amikino en la rondo  
 kantas kanton pri l'espero,  
 kaj pri vivo detruita  
 Ŝi rakontas kompatante, -  
 mia vundo reŝrapita  
 min doloras resangante.*

*"Ĉu vi dormas?, ho, sinjoro,  
 kial tia senmoveco?  
 Ha, kredeble rememoro  
 el la kara infaneco?"  
 Kion diri? Ne ploranta  
 povis esti parolado  
 kun fraŭlino ripozanta  
 post somera promenado!*

*Mia penso kaj turmento  
 kaj doloroj kaj esperoj!  
 Kiom de mi en silento,  
 al vi iris jam oferoj!  
 Kion havis mi plej karan -  
 la junecon - mi ploranta  
 metis mem sur la altaron  
 de la devo ordonanta!*

VALORA POR LA TUTA MONDO



Dro. L.L.Zamenhof  
 kun sia edzino 1908



La naskiĝdomo de  
 L.L.Zamenhof

**La Redakcio deziras feliĉon, sanon kaj  
 sukceson trovi novajn Esperanto-adeptojn  
 en la jaro 1997!**

☞ Mehr über Esperanto auf den Seiten 2 und 3!

## Legenden und Tatsachen über Esperanto

Schön wäre es, wenn alle Leser bereits wüßten, was Esperanto ist und was es bezweckt (oder gar, wenn alle bereits eine positive Meinung von ihm hätten). Natürlich dürfen wir das nicht voraussetzen. Erstens werden Esperanto und überhaupt Sprachprobleme eher selten und meist oberflächlich in den Massenmedien und anderen weithin benutzten Informationsquellen abgehandelt. Zweitens paart sich die Information über Esperanto manchmal mit hartnäckigen Vorurteilen bezüglich der vermuteten Künstlichkeit / Loblosigkeit / Ausdrucksarmut der Sprache selbst, der Ausichtslosigkeit ihrer weltweiten Einführung, der Naivität ihrer Anhänger, die sie angeblich als patentiertes Mittel zur Herbeiführung des Weltfriedens ansehen, oder gar von wegen ihres angeblichen Ablebens. Drittens, was ärgerlicher ist und schwerer zu bekämpfende negative Auswirkungen hat, leisten sich einige Esperantisten selbst eine Art Öffentlichkeitsarbeit, die auf kritische Menschen abschreckend wirken mag, und mit der einige Leser in Berührung gekommen sein könnten. Im Folgenden soll auf sattem bekannte, übertreibende Werbeargumente verzichtet werden, was etwa die Zahl der Esperanto-Sprecher oder die Lernleichtigkeit der Sprache angeht.

### Was ist überhaupt Esperanto?

Esperanto wurde 1887 von Dr. L. L. Zamenhof, einem im russisch beherrschten Teil Polens lebenden jüdischen Augenarzt, als neutrale, d.h. nicht an ein bestimmtes Land oder eine bestimmte Ländergruppe gebundene, internationale Sprache vorgeschlagen. Er wollte eine leicht erlernbare, regelmäßige Sprache

entwickeln und mit Gleichgesinnten erproben, die in einem zweiten Schritt als internationale Zweitsprache für alle eingeführt werden sollte. Jede Nation und ethnische Gruppe sollte selbstverständlich die eigene Sprache beibehalten. Zamenhof erhoffte sich von seinem Vorhaben mehr als einen rein praktischen Nutzen. Schon während seiner Kindheit bekämpften ihn die teils blutigen Konflikte zwischen den sprachlich verschiedenen



Titelblatt von «Sennacieca Revuo», Organ des Sennacieca Asocio Tutmonda (Nationenunabhängiger Weltbund), 1923

Volksgruppen in seiner Heimatstadt Białystok (im heutigen nordöstlichen Polen). In dieser neutralen, allen Menschen gleichermaßen gehörenden Sprache sah er einen wichtigen Friedensstiftenden Faktor.

Esperanto hat einen ersten, gar nicht gering zu schätzenden Durchbruch geschafft, indem es eine generationsübergreifende lebende Sprache geworden ist, die einige Hunderttausend Menschen in aller Welt gelernt haben. Der Esperanto-Weltbund (UEA: Universala Esperanto-Asocio) hat zur Zeit (Stand von 1994) 21.500 Mitglieder in 120 Ländern. Der kleinere SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda = Nationenunabhängiger Weltbund) wurde nach dem ersten Weltkrieg als Arbeiter-Esperantisten-Verband gegründet und sammelt heute linkspolitisch und ökologisch orientierte Esperanto-Sprecher. Durch den Gebrauch in einer realen Sprachgemeinschaft hat die Sprache ihre Verwendungs- und Entwicklungsfähigkeit unter Beweis gestellt und erweist ihren Sprechern auch praktische Dienste.



Titelblatt von «Sennacieca Revuo», Organ des SAT, heute

### Was kann man mit Esperanto anfangen?

Es soll nicht der unterschwellige Eindruck entstehen, daß sich die Esperanto-Sprecher hauptsächlich mit Informationsarbeit und Sprachpflege befassen. Ganz im Gegenteil. Die Esperanto-Sprecher begreifen sich vielfach genau als solche, als Sprecher einer bestimmten Sprache, und nicht als Esperantisten, d.h. Anhänger einer organisierten kulturpolitischen oder sprachpolitischen Bestrebung. Die eher geringe Intensität der nach außen gerichteten Informationsarbeit wird von diesem Selbstverständnis mitbedingt.

Die meisten Esperanto-Sprecher benutzen ihre Sprachkenntnisse auf Reisen, indem sie mit Bekannte Kontaktaufnahmen bzw. vermittels eines der Adressenverzeichnisse Kontakt knüpfen.

Über das ganze Jahr finden Dutzende von internationalen Treffen, Tagungen und Freizeitaktivitäten statt, die sich häufiger mit aktuellen gesellschafts- und kulturpolitischen Fragen und mit sonstigen Themen beschäftigen, als mit Esperanto selbst.

Viele haben im Esperanto eine Möglichkeit erkannt, sich bei geringem Lernaufwand weltumspannende Kontaktmöglichkeiten zu erschließen. Manche, die in der Schule keine Fremdsprache ausreichend oder überhaupt lernen konnten, haben mit Esperanto ihre ersten Fremdsprachenkenntnisse erworben können. Diejenigen, die schon eine oder mehrere Fremdsprachen beherrschen, lernen die Grundlagen des Esperanto in wenigen Wochen. Wer will, kann Esperanto in internationalen Fachverbänden anwenden oder in Ortsgruppen, Landesverbänden oder internationalen Organisationen mitmachen.

Gary Mickie

Esperanto-Lehr- und  
Wörterbücher preis-  
günstig bei:  
Rolf Beau, Saxonia-  
str. 35, D-04451 Althen

titolo →  
Aus: INFO-Serie Nr 1 -  
Maldekstra Forumo;  
liefert geg. Rechnung  
Esperanto-Centro Berlin  
Falkstr. 25, 12053 Berlin

→  
neĝustajo!



### Bonvolu, Marianino – foriri

Doloras vere, ke vi ne povas esti la mia por ĉiam, kara Marianino.

Ĉar vi estas la plej mirinda virino, kiu iam alin krucis mian vojon. Vi estas la idealo, la fatamorganio, kiu eniris la vivon.

Bela vi estas, Marianino — bela de tia speco, kiu ekflamigas la sangon de ni, la viroj. En la matenruĝo iam mi vidis vin bani en rivero: Vi staris tie, rektiginte vin, la manoj levinte al la ĉiellumo kaj via bronza figuro estus ornamanta ĉiun grekan templon. Jes, vi estas bela, kaj viaj karesaj manoj estas mildaj kaj samtempe stimulaĵaj, ekscitaj. Neniu alia virino estas tiom nura amo.

Bona vi estas, Marianino, ĉar vi ne povas esti alia ol bona. Ĝi estas naskita kun vi, tiu boneco, ĉiam preta por homoj, kiuj ĝin aspiras aŭ bezonas.

Sed tamen vi ne estas enuiga anĝelo. Ho ne! Vi estas virino en sia tuta diverseco, varieco, kiu samtempe montras la grandan unuecon de virino. Eva, Monalisa, Madona, Dorotea, Diotima, Lulu...

Mi amas vin kiel mi neniam amis virinon. Sed vi forglitas, eskapas, se mi volas teni vin.

Estas mia kulpo!

Vidu, Marianino, mi ŝatus senti vin por ĉiam en la proksimo, ĉar kun vi la monda beleco duobliĝas. Mi foruzas min pro sopiro, tamen mi scias, ke ni neniam posedos unu la alian.

Alia sorto estas destinita por vi, „laŭ la leĝo, sub kiu vi alpaŝis“. Mi lasis vin iri en la mondon kun koro sanga, por ke vi rigardu ĉirkaŭen, por ke vi amu, suferu, indulgu, kiel estas disdonita al via homeco kaj virineco. Ĉar ĝuste virinoj kiel vi, distingitaj kiel vi kun ĉiuj donacoj de la korpo kaj animo, devas havi la

abundon de la viziĵoj kaj de la travivaĵoj por plenumi sian mision.

Ho, kuŝis en mia mano, teni vin en proksima rondo de mia vivo, vin enŝlosi en la kaĝon de mia sopiro. Ne: Vi ne povus defendi vin, vi estis transdonita al mi. Sed mi subigis min, ĉar vi ne apartenas al mi, sed al la mondo. Mi vin elsendis, kontentigis min direkti viajn nevideblan sorton, doni al vi, kio decas.

Mi lasis vin multon travivi. Kvankam tio preskaŭ disŝiris min pro ĵaluzo — mi cedis vin al aliaj viroj, mi lasis vin elĝui ĉiun volupton kaj turmenton de amo ĝisfine kaj lasis vin fariĝi tiel pli kaj pli bela, pli granda, pli matura, tiom altruisma mi estis — ankaŭ aliuloj devus ĝoji pri vi, ekkoni je vi, ke ne ekzistas pli valora bono sur tero ol virina amo.

Sed mi ne povas liberigi min de vi, Marianino. Mi envias aliulojn, ke ili povas komuniki kunavi. Ah, se mi ne estus forlasinta vin. Nun mi ofte suferas pri nostalgio. Mi klopodas, forĝesis vin; mi ŝlosis la pordojn de koro kaj domo, sed ĉiam denove neatendite vi staras apud mi, alrigardas min kaj aspiras mian amon.

Tio devas ĉesi! Nu, iru do, Marianino, ĝenu min ne plu: Jes, estis bele, sed nun iru, iru...!

Aŭ — mi vin frakasos per konfeso: Mi jam estas enamiĝonta aliulinon. Sibilino estas ŝia nomo.

Ŝi estas romanfiguro same kiel vi. Same kiel vin, mi kreis ŝin el la nenio, ŝi estas mia propra kreaĵo kiel vi. Mi skribis ĉirkaŭ ŝia estaĵo historion kaj ŝargis ŝin kun sorto. — Same kiel vin.

Do, Marianino, iru. Vi ja tamen ĉiam denove estas kaj restas ĉe mi: pere de Sibilino...

*— In der Anfänger: dolori - schmerzen; mirinda - bewundernswert; ekflamigi - entzünden; rektiginte - aufreckend; eksciti - erregen; enuiga - langweilen; foruzi pro sopiro - sich 'verzehren' aus Sehnsucht; indulgi - dulden; enŝlosi - einschließen; nevidebla - nicht-erkennbar; deci - sich geziemen; elĝui - auskosten; frakasi - zerbrechen; enamiĝonta - (auf dem Wege)sich zu verlieben.*

Membreco en LIBERA ESPERANTO-ASOCIO kostas nur 15,- DM jare. Kollzo enhavas liveradon de la organo MAGAZINO kaj LEAG-servicojn. Tujajn INFO-n vi ricevas de A. Stöppan, Rarchenher Str. 47, D-77704 Oberkirch

## NAZI - KULTURO 1933

de fama LEA/G- kaj SAT-membro  
Bruno Siebert (1893 - 1973)

- unua parto -

Nia Riechthofen-urbo(1) Schweidnitz (Ŝveĉio), distrikto Breslaŭ, jam de longe famiĝis kiel loko de reakcio kaj Nazilismo. Estis ofte ĉi tie ja persone Hitler kaj Heines(2) por paroli al la popolo. Ne nur la politikaj, sed ankaŭ la kulturaj organizoj estis kontraŭbatalataj, kalumniataj kaj minacataj. Post la tielnomata 'potencakiro' en Januaro 1933 la Nazi-teroro libere kaj brutale kuŝis. Pliiĝis arestadoj, kontraserĉoj, juĝdebattoj en partitribunaloj, deportadoj ktp. Ankaŭ la lokaj grupoj de Germana Laborista Esperanto-Asocio kaj S.A.T. (Internacia Esperanto-Asocio de laboristaj esperantistoj) estis same malamataj, persekutataj kaj malfondataj kiel la antifaŝistaj unuigoj.

En la nokto de la 9-a al la 10-a de Aprilo 1933 mi estis malkaŝata de serĉ-taĉmento en la loĝejo de mia patrino. Minacata per pistolo kaj la kutimaj instigoj (puŝoj al la dorso) mi estis transportata en malgranda aŭto al la Societa Domo en antaŭloko de Kroischwitz (Kroŝvic) kie estis Nazi-gastejo. Dum tri tagoj tie okazis pridemandoj. Oni iris min en la grandan candelosalonon kie de post kelkaj horoj jam troviĝis 60 ĝis 70 teror-viktimoj, sidantaj aŭ starantaj. Gardistoj estis SS- kaj SA-viroj(3) kun pistoloj kaj karabenoj. Parolmalpermesoj, skribkomparoj (pro laŭdiraj anonimaj leteroj) estis kutimo. Kaŭĉukaj bastonoj kaj pafikfustoj iom post iom estis uzataj. Ju 'Reichsbanner'-viro(4) provis per razklingo traranci siajn artenojn; li jam estis pridemandita. En angulo kuŝis amaso da horoj, kiujn oni estis fortondintaj aŭ elŝirntaj de la viktimoj.

Post timora atendado kaj pridemandado oni venigis min en la bilardĉambron. Tie ĉeestis 20 ĝis 25 personoj: SS, SA, krimalkomisaroj, policistoj kaj ses 'batistoj'. Ŝarĝitaj pistoloj, kaŭĉukaj bastonoj, bier- kaj konjak-glasoj estis la dekoracio de la grandparte ebonetaj 'popo-uloj'. Per piedbato transportite mi falis kontraŭ la bilardtablon. Mi diris: "Bonan vesperon!" Nun komenciĝis la procedo.

"Ha, malbenita porko, vi ne diras 'Heil Hitler'. Kie troviĝas la germana saluto? Eliru, vi ruĝa sterkoputo kaj ripepsu ankoraŭ duonan horon!"



Piedbato kaj perkarabena puŝo - kaj la unua akto estis pasinta. Intertempe oni preterkondukis kelkajn aliajn kunsuferantojn, kiuj estis sangomakulitaj kaj havis disŝiritajn vestaĵojn. Oni transportis ilin al Heines en Breslaŭ.

- (E) Maglibro de Bruno Siebert. Trad. Walter Poppeck.  
Rim: (1) Riechthofen, barono Manfred de (1892-1918)  
(2) Heines, Edmund, eks-leŭtenanto, brutala alloga SA-gvidanto  
(3) SS - simtaĉmento nazia, batal- kaj terororganizo  
(4) SA - sturmtaĉmento de la nazi-partio  
Reichsbanner - socialdem. organizo de militpartoprenantoj  
> daŭro de la komuniko en MAGAZINO n°18<

### Kein Raum für Esperanto im nationalsozialistischen Staat

Berlin, 8. Juni. Der Reichs- und Preussische Erziehungsminister hat an die Unterrichtsverwaltungen der Länder folgenden Erlaß geschickt: Die Frage künstlich geschaffener Welt Hilfssprachen wie der Esperanto-Sprache hat im nationalsozialistischen Staate keinen Raum. Ihr Gebrauch führt dazu, wesentliche Werte völkischer Eigenart zu schwächen. Es ist daher von jeder Förderung eines Unterrichtes in solchen Sprachen abzusehen. Unterrichtsräume sind für diesen Zweck nicht zur Verfügung zu stellen.

Ein Erlaß aus dem Jahre 1924, der für die höheren und mittleren Schulen ergangen war, und den entgegengeetzten Standpunkt einnahm, ist aufgehoben worden.

Traduko: Ne spaco por Esperanto en la Nazi-ŝtato

Berlin, 8-a de junio (1936). La ŝtateminiŝtro por edukado direktis al la eduk-administratoj de la (germanaj) landoj: La legado de artefanta kreitaj mondiaj helplingvoj kiel la Esperanto-lingvo ne havas spacon en la nacionalsocialista ŝtato. Sia uzo kaŭzas malfortigon de popolo originala. Pro tio oni flankelasi progresigon de instruado de tiaj lingvoj. Instruadambroj ne estu je dispono. - Dekreto el la jaro 1924 por la altaj kaj mezaltaj lernejoj pri kultura vidpunkto ne plu validas.

(Germana teksto el: Neusser Zeitung, Juni 1936)

**SAT SUR TTT : <http://myweb.worldnet.net/sat-esp/>**

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

## Ĉu Germanio en la fino?

En Julio 1931 skribis rangaltaj industri-estroj al la tiama germana regna kanceliero Brüning:  
"Oni devas forpreni de la ekonomio la katenojn..., por ke ĝi povas prezenti siajn fortojn."

Ni konas la konsekvencojn: Milionoj da senlaboruloj, mizero, malriĉeco kaj malsato. Sekvis la Hitler-diktaturo kaj klopodoj estingi la judojn, ties kapitalon kaj entreprenojn transprenis la t.n. kristanaj entreprenistoj per la beno de la Naziistoj.

La nuntempa germana kristan-liberal-demokrata registaro intencas ŝpari. Modeloj estas USONO eĉ Svedio kie la socialaj akiraĵoj kaj laborplacoj estas reduktitaj. Germanio malaltiĝos la impostojn kaj intencas "peti al la kaso" senlaborulojn kaj pensiulojn. Intertempe altiĝas la lu-prezoj ktp.

Ĉu estonte ne plu modela sociala Germanio?

KHK

## Trudherbo disvastiĝas katastrofe

La faŭno kaj flaŭro de la mondo ŝanĝiĝas senĉese. Specoj de plantoj disvastiĝas aŭ estas minacataj de kompleta ekstermiĝo. Aliflanke, multaj specoj de plantoj minace disvastiĝas, sin trudantaj en kampojn konkurante kun kulturplantoj. Tie ili kaŭzas grandajn perdojn de rikolto.

Dum la lastaj jaroj ĝi disvastiĝis en Germanio eble ankaŭ en aliaj najbara landoj. Estas la giganta „Ursokrifo“ (Heracleum giganteum) aŭ germane „Riesenbärenklau“. La planto riziĝas ĝis 2,50 m alta. Laŭ mia scio ĝi estis enkondukita antaŭ ĉirkaŭ 100 jaroj kiel ĝardenplanto kaj estis siatempe populara. Ĝi aspektas tre impona.

Tamen ĝi disvastiĝis, unue precipe laŭlonge de la aŭtoŝoseoj kaj tie ĉefe grandkvante sur nekultivataj kampoj. Nun oni timas, ke ĝi invadas ĉiuspecajn kulturojn kaj kaŭzas rikoltperdojn. Mi vidis ĝin jam meze de la urbo en la parkoj. Apude ĝi kaŭzas alergiacajn malsanojn ĉe kontakto de la haŭto kun la planto. La planto ne nur minacas kultivitajn kampojn sed ankaŭ naturprotektatan teritorion. Tie la planto premmortigas la aliajn plantojn kaj sekve ĝenas la faŭnon. Por savi la naturprotektatajn teritoriojn nun oni provas elhaki la trudherbon. Mi esperas, ke oni trovas sin ne senhelpa en la prilukto kontraŭ tiu trudherbo.

KHK



## La ĉiutagaj malagrablaĵoj

Ĉu ĉiu konas ilin? Kion oni povas fari kontraŭ? Neniu tago sen ĉagreno. Oni ĉagreniĝas pri fuŝemaj metiistoj, blokitaĵoj, malrapida kasistino ĉe la superbazara kaso, ke la edzino tro malfrue revenis hejmen de la laboro aŭ, ĉar la infanoj denove stresas.

Fremda aŭto blokas vian garaĝan enveturejon: Zorgu pri fortreno! Tamen atentu, ke vi la kostojn 100 - 300 gmk. devos unue mem pagi. Vi povos poste peti de la blokanto repagi la kostojn, se vi ne forgesis noti la aŭtonumeron. Eblas ankaŭ informi la policon.

En via poŝtkesto ne plu estas spaco por leteroj de viaj Esperanto-korespondamikoj, ĉar ĝi estas stopita per entreprenoj varbiloj. Vi povas malebligi tion: Skribu al DDV Robinson-Listo, Nax-Eyth-Str.6, 71256 Ditzingen, kaj informu, ke vi ne plu ŝatas varbmaterialojn. Kaj kontraŭ varbiloj, kiuj ne venas per poŝto, helpas aŭto: Malpermesate enĵeti varbilojn! (Atentu, uzu por l'affiŝo vian landan lingvon!)

Oni liveras al vi varojn, kiujn vi ne mendis. Povas esti ruzaĵo de ne-serioza vendejo. Rifuzu la akcepton, ne pagu rembursan sendaĵon.

Seksa ĝeno kaj sintrudado per telefono: Aĉetu "safe-call"-aparaton por 130,- gmk. ĉe elektronik-vendejo. Per tiu aparato vi povas instali en vian telefonon sekretan numeron.

Vintra finvendo: Ekstraj ofertoj vi povas ŝanĝi, se ne estas objekto, kies prezo estas reduktita.

Rifuzu poŝtkontrolon en superbazaro, se bazardektivo pretendas, ke li vin vidis ŝteeli. Vian mansaketon aŭ retikulon deponu antaŭ aĉeto nur, se oni prezentas ŝloseblan fakon.

(Kolektitaj el "ruzaĵ" libroj de Stefano)

La angla estas simpla, sed malfacila lingvo: Ĝi konsistas NUR el fremdaj vortoj, kiujn oni prononcas malĝuste!  
Kurt Tucholsky (1890-1936)  
>fama germana verkisto<

## Stranga lokigo

Dum parolado en aprilo diris nia kanceliero Kohl (laŭ Frankfurter Rundschau 27.04.96):

"Por krei pli da laborlokoj, ni devas plibonigi la ekonomiajn eberecojn en Germanio, ni devas senŝarĝigi la entreprenojn de im postoj kaj de aliaj kostoj inkluzive de la salajraj- kaj apudsalajraj kostoj."

Samajn vortojn oni ofte aŭdi aŭ legi lastatempe kaj ankaŭ la "5 ekonomiaj saĝuloj" uzis similiajn vortojn en ilia novembra raporto. Ili ja ĉiujare dufoje raportas al la registaro pri la evoluo de la ekonomio en Germanio kaj rekomendas pri eventuale estontaj necesaj paŝoj sur la ekonomia kaj financa kampo.

Ili parolis pri kresko de la ekonomia produktado je 2,5% dum 1997, sed ili ankaŭ diris, ke la senlaboreco kreskos ankoraŭ 1997 al pli ol 4 milionoj.

Dum la eksporto kreskos, la enlanda konsumado restas sama aŭ eĉ malkreskos. Multaj germanoj havas malpli da enspezoj aŭ timas senlaborecon. Pro tio ili estas ŝoaremaj kaj gardas siajn elspezojn, laŭ la "saĝuloj". Tamen ĉi-tiuj rekomendas retenon en la salajra politiko, do ne altigon de la salajroj dum ankoraŭ pliaj jaroj. (Sed ĉu per tio oni kreskigos la enlandan konsumadon? F.Bs.)

Aliflanke legeblas, ke la enspezoj el memstara laboro kreskis dum 1996 je proksimume 12,4% dum tiu de la nememstara laboristoj nur kreskis je 0,1%. La tiujataj diferencoj por la jaroj 1994-1996 estas laŭ tiu raporton: kresko el memstara laboro 43,7%, kresko el nememstara laboro, do, de la laborprenantoj, 1,65%. Raporte la "saĝuloj" konkludas, ke oni devus pli malaltigi la kostojn kaj la impostojn de la ekonomiaj entreprenoj por forigi iliajn malbonajn ŝancojn pli gajni (Zur Beseitigung der Ertragsschwäche), por ke ili kreu novajn laborlokojn.

Dum marto 1996, do, unu monaton antaŭ la citita parolado de la kanceliero, la gazeto >Frankfurter Rundschau< raportis la jenon laŭsence:

"Forma fongo de laborlokoj pelas la gajnon de la firmao Schering al rekorda alteco".

>Klangoel: La firmao Schering forstrekis de 1991 ĝis 1995 proksimume 8.000 laborlokojn kaj kreskigis per tio siajn financajn rimedojn je pli ol 1 (unu) miliardo!

Alia raporto: "Forigo de laborlokoj ebligis al la firmao Bayer gajnon je rekorda alteco."

>Klangoel: La firmao Bayer atingis 1994 al 1995 pli altan gajnon de 20% per la forstreko de laborlokoj!

Do, ŝajnas tamen, ke altaj gajnoj de la entreprenoj ne garantias la sekurecon de laborlokoj aŭ eĉ ilian novan kreon.

Ĉu eble la kanceliero dum la citita parolado dum aprilo 1996 ne konis tiujn gazetajn informojn de marto 1996?

Nu, rememoru al alia parolado de li dum septembro 1993 dum kongreso de la CDU en Berlino. Jen li sisteme diris:

"Nur kiam multaj (laborprenantoj) devas timi perdi ilian laborlokon, ili estas maturaj por precensi, ke ni ne devas organizi la socion kiel kolektivon liberempanon."

Tio sonas iomete pli alie ol lia parolado dum aprilo 1996.

Ĉu oni ne rajtas nun almenaŭ iomete pridubi la sukceson de la nunaj pianoj de la registaro duonigi aŭ almenaŭ plimalgrandigi la senlaborecon?

La registaro, almenaŭ la kanceliero kaj la frakciestro de la CDU ja forte kaj ofte apelacias al la laborprenantoj plenumi ilian promeson kaj krei novajn laborlokojn.

Ĉu kun sukceso? Almenaŭ la opozicio tion neas. Nur la estonto tion montros, mi almenaŭ ankaŭ iomete dubas!

F.Bues

## Rememoradoj pri la lasta somero

### I.

Mi, kiu loĝas en ebena regiono, ferias tre ofte en la Alpoj. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj mi opiniis, ke oni havas la plej belan elrigardon nur de la altajn pintojn de la montoj. Hodiaŭ mi pensas, ke tio estas ĝusta nur parte. Ĉar mia sanstato ne plu permesas, ke mi grimpas sur la rokojn, mi migras volonte en la "duona" altajo. Tie mi eltrovis por mi tute novajn aspektojn. Lastfoje mi sidis en la ombro de iu roko kaj rigardis la proksiman ĉirkaŭaĵon, estis natura rokĝardeno kun siaj malgrandaj floroj. La ĝardenistoj en niaj botanikaj ĝardenoj ne povas limi ĝin pli bela. Ankaŭ la pintoj de montoj aspektis de mia sidloko pli klaraj kaj pli belaj. Estis loko por rivi. Kiam mi rigardis valen kaj vidis tie la modernajn „sidmigrantojn“ en iliaj „laca kaĝoj“, mi kompatis ilin, ĉar ili vidis antaŭ si preskaŭ nur grizan asfaltan.

### II.


Estis vespere, la vetero estis bela kaj mi sidis en la ĝardeno. Tamen iu ne ŝatis, ke mi sidis pace tie. Unue kantanta aŭfluga ardeeto kaj tiam baris sin io en mia haŭto kaj postlasis malagraban jukadon. Estis kulo.

Kuloj estas krespuskaj kaj noktaj insektoj. Ili pikas siajn viktimojn plej ofte vespere kaj dum la dormo. La homo „allogas“ ilin per sia korpa temperaturo. La kuloj pikas, ĉar ili malsatas. Ili ŝatas nian sangon kiel nutraĵo.

Sed ĉu vi scias, kiu sučas kun plezuro la homan sangon? Estas la virina kulo: la ŝato sučas nur plantosukon. ? ? ? !!!

Ne hian komenton!

KHK

 Leteroj al la redakcio

HALE Hispana Asocio de Laboristaj Esperantistoj skribis 08.11.96:

"... Koran dankon pro la sendo de la jubilea eldono de MAGAZINO n°16, 1996. Tre atenteme mi legis ĝian enhavon ege interesa kaj instrua pri la diversaj eventoj rilate la starigo de LEA/G kaj ĝia evoluo en nuntempa epoko. - Malgraŭ la malfacilaĵojn, kiuj nun renkontas la laborista laborista Esperanto movado en pluraj landoj ni devas, por ke niaj laboristaj asocioj daŭre provu ekzisti kaj progresi, propagandi kaj senlace labori por niaj celoj. - Dezirante prosperon kaj longan vivon al LEA/G kamaradece salutas vin  
Marteno Bustin Benito, Alicante"

Komuniko de C.N.T. Esperanto-Fako, Parizo (el okt.1996):

"En 1862 estis fondita en Londono la UNLA INTERNACIA LABORISTA ASOCIO (I.L.A.) Ĝi estis maifondita en 1875, sed refondita en 1922 dum kongreso kiu okazis en Berlino. - Tiutempe novaj statutoj estis verkita, inspi-ritaj de la tezoj de la revolucia sindikatismo kaj de la anarko-sindikatis- tismo. Pluraj 'naciaj' konfederacioj daŭre aktivas en la mondo, sekvante la gvidliniojn de tiuj statutoj. - La organizo I.L.A. surfoje rekomendis la uzon de Esperanto. Por apliki tiujn rekomendojn, grupo de francaj anarko-sindikatis- toj eldonis esperantan version de tiuj statutoj. ..."

Ni ndu.

Du tervemoj rendezuas. "Kie estas via amiko?" demandas la unua. - "Ah", ĝemas la alia, "li devis iri al la fiŝkoko."

Klientino: "Bonvolu pardoni, ĉu mi rajtas provi sumeti la kostumon jen en la montrafenestro?" - Vendiŝtino: "Nu, jes, kompreneble, sed ĉu ne pli bone taŭgas vestoŝanĝejo?"



Esceptaj prezoi  
MAGAZINO-  
LIBROSERVO  
ofertas el eta stoko:

INFO-Serie - N° 1 u. 2 ..... 1,- DM  
Esperantomono (broŝ.) ..... 2,-  
Lernolibroj de Wingen por komencantoj k. progresantoj po 6,- DM  
Skize pri Esperanto-Teatro kajero 1 ..... 2,- DM  
Ausstellungskatalog - Arbeiter-Esperanto-Bewegung ilustr. Broschüre, zweisprachig, (Hüser-Institut)... 10,- DM (Ekspedokostoj inkluz.)  
Vendas: LEA/G - A. Stephan Renchener Str.47 D-77704 Oberkirch (Baden)



### MONDO DE KOMPUTILO

MAGAZINO serĉas tradukojn de komputilaj terminoj kaj petas legantojn, kiuj uzas komputilon, letersendi tradukojn al:

MAGAZINO - A. Stephan Renchener Str.47 D-77704 Oberkirch (Baden)

hardware ... software ...  
Prozessor ... Hauptspeicher ...  
Cache ... Festplatte ...  
CD-ROM-Laufwerk ...  
Grafikkarte ... Chip ...  
Computer ... Harddisk ...  
byte ... gigabyte ... bit ...  
MB ... GB ... KB ...  
RAM ... Konfiguration ...  
Zwischenablage ...

Ĉio alsendo estos rekompencata!

### Interreto

Mi konsentas kun Rik Dalton (BE jan-feb '96), ke estas domage, ke la Esperanto-Asocio de Britio ne havas aliron al la Interreto. Tamen, mi miras pri lia logiko, ke la brita Esperantistaro devas esti malbone reprezentata en tiu medio pro la fakto, ke nur tĉi Esperantistoj estas anoj de CompuServe. Jam dum pli ol unu jaro mi partoprenas la Reton, sed nepre ne pere de CompuServe (ofte nomata angle CompuServe aŭ CompuSpend), ĉar tiu servo estas bone konata kiel unu el la plej altkostaj manieroj aliri la Reton, pro la altaj krompagoj postulataj aldone al la baza abono. Mi uzas la servon de Demon, unu el la multnombraj provizantoj de rekta aliro al la Reto. Aldone, tiuj, kiuj estas anoj de alternejaj institucioj povas senpage kontakti la Reton pere de JANET.

Bedaŭrinde, mi devas konfesi, ke mi ignoras Esperanton ĉe la Reto, krom uzi la eblecojn komuniki per elektronika poŝto kun individuoj, SAT kaj Monato. Pro la senfinaj diskutadoj pri gramatikaj maltemoj, mi tiom enuegis, ke mi forĵetis la Esperantan novajgrupon el mia kolekto post kelkaj semajnoj ĉar ĝi fariĝis entute nedigestebla. Ankaŭ en la elektronika medio, Esperantistoj preferas senfine sekci la lingvon sub publika rigardo anstataŭ montri, ke temas pri eistara komunikrimedo, per kiu eblas pritrakti ĉiujn eblajn temojn.

Parenteze, sed rilate, mi volas jam nun anonci, ke la kunveno de KKK ĉe Saffron Walden mi ne partoprenos, ĉar ŝajnas al mi senutile partopreni dum E-kongreso aranĝon, en kiu oni intencas uzi la anglan.

Krys Ungar

(krys@pamaso.demon.co.uk)

Nia Leganto Georges Brouel, Catus, skribis konc. la artikolo en MAGAZINO n° 16, pago 5:

"... inspiras al mi la jenajn pripensojn: Ĉiu scias, ke la germanoj estis la unuaj kiuj rezistis kaj suferis pro la nazismo. Agadoj kiel tiuj de Paul Schalmey (Hanovro), kiu servis en la internacia brigado (Hispanio) devus esti pli bone konataj. - La hispana civila milito finigis en 1936, do, li ne povis esti internigita en Nordafriko flanke de la francaj (Pétain)-autoritatoj. Miaj kamaradoj kaj mi, kiuj legas MAGAZINO-n, estus tre feliciaj, kiam ni ricevus detalan informon pri la vojo de Schalmey."

(Red.: Ĉu kamarado en Hanovro povos informi pli detale? Jen adreso de Georges: G. Brouel, Rue du Pont, F-46150 Catus)

**Lingva angulo - Sprachecke**

MAGAZINO erscheint vier Mal jährlich. Einen Esperanto-Kursus lektionsweise zu publizieren würde bedeuten, daß der Lernende bei 12 Lektionen drei (3) Jahre - soll man sagen: verschwendet? - um endlich die internationale Sprache Esperanto 'intus' zu haben. Dabei geht's viel schneller!

MAGAZINO-redakcio rät, ein Lehrbuch (lernolibro) zu kaufen, etwa 'Wir lernen Esperanto' von Wingen, und sich täglich eine halbe oder ganze Stunde mit den jeweiligen Lektionen zu beschäftigen. Nimmt man sich alle 14 Tage eine halbe Lektion 'zu Gemüte', dann kann man Sylvester oder Ostern oder Pfingsten, je nachdem man angefangen hat, das lernolibro schliessen, sich auf die Schulter klopfen und sagen:

"Mensch, Junge, ich hab's geschafft, ich spreche Esperanto." (Aber nicht nur 'jes' wie der onklo Alberto.)

Und MAGAZINO-redakcio steht zu Ihrer/Deiner Verfügung, wenn Fragen auftauchen, Namen und Anschriften (nomoj kaj adresoj) von Esperantofreunden, Daten (datoj) von Kongressen irgendwo in der Welt gewünscht werden. Wir beantworten jede Postkarte, jeden Brief prompt.

Wir nennen auch die Bücherdienste, die lernolibroj verkaufen, und die Esperanto-Sprachvereine, wo man Mitglied werden kann.

**Besser Freundschaft per Esperanto als Krieg mit dem Nachbar.**

AFS

**AMIKECA RELO**

"Wenn man dann Esperanto sprechen kann, sollte man nicht zögern, es anzuwenden. Meinetwegen auf Reisen. Ich empfehle die Mitgliedschaft im Amikeca Reto (Freundschaftsnetz). Ich habe damit Kontakte aufgenommen und war schon



oft bei Esperanto-Familien zu Gast. Die Aufnahme war super, egal ob in Frankreich, Holland, Japan oder sonstwo. Mit Töchtern, Söhnen habe ich klasse Freundschaft geschlossen. Sie kommen mich besuchen, meine Einladung gilt. ... Ĉerizeto aus Kolonjo"


Das Adressverzeichnis von Amikeca Reto gibt es für gerade mal 25,- DM (inkl.Versandk.) und, man ist gleichzeitig Mitglied (membro) und kann seine eigenen Angaben erscheinen lassen.

Es liefert gegen Rechnung:

A. Stephan, Renschener Str.47,

D-77704 Oberkirch/Baden Tel.07802-90336


**Onklo Alberto kaj nevo Henriko**



Mi scipovas Esperantoni! Eri ordi, diru vorton.



Jes. Ha, ha, tio estas angla



Ciao, ciao, bucaco

Sketch: Margot Stephan



## Mortis Adolf Schwarz 1906 - 1996

Li estis unu el la rimarkindaj homoj trovataj en la moderna socio inter tiuj, kiuj volas realigi socian justecon kaj helpe de Esperanto veran interkomprenon, interfratiĝon kaj pacon inter la popoloj. Li estis internaciisto, tamen konscia germano kaj aktiva en la laborista Esperanto-movado.

Naskita je la 6-a de decembro, 1906, en Trier li spertis jam dum junaĝo socian mizeron en la tiama Germana Respubliko post la unua mondmilito (1914-1918). Tio kaŭzis, ke li aktivis en la laborista movado, kie li kontaktis kun Esperanto. Entusiasme li studis la lingvon kaj aniĝis al la Germana Laborista Esperanto-Asocio kaj al S.A.T. - Sennacieca Asocio Tutmonda. - Ekvidante, ke Esperanto estas taŭga ilo por interkompreno de l'popoloj kaj realigi pacigan internacismon, li serĉis kaj trovis tiurilatajn spertojn en praktika poresperanta laboro en diversaj eŭropaj landoj.

(Laŭ informo de Bruno Vogelmann, Crailsheim)

## Arbeiter-Esperanto-Bund in Leipzig

In Leipzig erschien in deutscher Sprache 'Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes in Leipzig (Westsachsen)'. Das von der Autorin, Ino Kolbe, gesammelte Material auch Illustrationen, wurde mit Hilfe von Dr. Detlev Blanke, in einem Buch in zwei Teilen veröffentlicht und zwar für die Jahre 1908-1924 und 1925-1933.

Für SAT-Mitglieder, die der deutschen Sprache mächtig sind, sind die Abschnitte über damalige SAT-Kongresse sicherlich von Interesse.

Im Übrigen wird auf eine Rezension von Friedel Bues, Hannover, die eine ausführliche Darstellung von mir erübrigt und die das SAT-Organ SENNACIULO publiziert, verwiesen.

Das Werk kostet 17,50 DM und kann beim Bücherdienst R. Beau, Saxoniastr.35, 04451 Althen, bezogen werden.

A.F. Stepan

### Oberkirch, Esperantostraße

2-Zi.-Wohnung, Kü., Bad,  
WC, 43,09 m<sup>2</sup> Wfl., Keller,  
Kabelanschl., Ofenheizung,  
DM 270.- - DM 81.- NK =  
DM 351.-, zum 1. 2. 1997  
oder früher zu vermieten.

### HEROLDO DE ESPERANTO

Oni povas ricevi senpage  
duoblan kongresan nume-  
ron de la gazeto pri lasta  
UEA-Kongreso en Prago.

Heroldo de Esperanto estas  
internacia sendependa  
gazeto de la Esperanto-  
Movado tutmonde. Ĝi estas  
grandformata kaj prezentas  
inter ok (8) kaj pli da paĝoj.

Skribu al: Heroldo-Redakcio

- Fighiera-Sikorska

Via N. Sandre, 15

I - 10078 Venaria R. (Torino)

Cetere: Abo kosta por ger-  
manaj legantoj 49 DM jare.



Fig. 22. Eine Zeichnung von Theodor  
Hosemann aus dem 1860er Jahren die  
Leidenschaft der Arbeiter in den Sachsen  
darstellt.

Desegno de Th. Hosemann el 1860  
per kiun li ilustris la mizeron de multaj  
laboristoj en germanaj urboj.

Kiam vi vizitos la Riviera de Italio  
mangu bone en la

Restoracio Esperanto

es Finale Ligure (de maro), prokz.  
de la stacidomo.

AFS




## Nacia Esperanto-Muzeo

La muzeo en FR-70100 Gray aĝis en la jaro 1996 jam 20 jarojn. Ĝi estas unika en Francio (eĉ Europo): Muzeo, biblioteko, centra arkivo kaj daŭra ekspozicio. La tuta kolekto sur 515 m da tabloj, en vitrinoj ktp. sur 230 kv. m. estas vidinda.

Kiam vi venos al Gray (orienta parto de Francio) ne forgesu viziti la muzeon, saluti kaj paroli kun estro Geo Junier.  
(Ni jam estis tie dufoje! ge-Stefanoj)

Postkongreso 1997



Internacia Ferio-Semajno de TANEF  
en la Naturamika domo "KNIEBIS"

09.-16. de aŭgusto 1997



NATURAMIKA  
INTERNACIO  
ESPERANTO FAKTO  
TANEF

### Hamburg-ano (41) vivis du jarojn en arbaro

Dezembro 1996. Antaŭ kristnasko trovis arbar-laboristoj en terkavo bonan kamuflititan kaŝejojn el lingvaj vandoj kaj kovraĵo kovrata per tero kaj branĉoj. Intern' kapalteco 110 cm.

La Hamburg-ano ekipis taŭga la-kaŝejojn por agrable enloĝi. Per sia gazkuirilo li prefere kuiris pastojn (ekz. Makaroni'), ĉar rapide pretaj kaj tuj manĝeblaj. Per varma akvo li povis eĉ duŝi. Sijaj vestaĵoj purigis lavejo en proksima urbo.

Pro senlaboreco li ne plu ŝatis vivi en granda urbo kaj migris tra Germanio kaj finfine decidis por ekzistado en Nigra Arbäro.

Polic'ón interesis la arbar-homo, ĉar li estas serĉata pro diversaj ŝteloj. La Hamburg-ano nun festas kristnaskon kaj novan jaron 1997 en mal' berejo, kie certe estas pli varma ol en kesto.

(trad. el Acher-Rench-bulteno - Ŝtefano)

### Omaĝo al k-do Roland Levraud

Por pli omaĝi al nia karmemora k-do 'ROL' SAT-broŝurservo preparas eldonon de liaj artikoloj kaj prelegoj de 1950 ĝis 1989. - Sub titolo 'Ne nur vortoj sed agoj' baldaŭ aperos la unua, 112-paĝa, kolekto da artikoloj. Sekvos alia broŝuro: 'Prelegoj kaj aliaj artikoloj' ariganta la tekstojn aperintajn en SENNACIECA REVUO (80 paĝoj en A4-formato). - Ambaŭ estos disponeblaj kaj liverotaj en la unuaj monatoj de 1997. En 'Laŭte' de nov.-dec.1996 aperos detaloj de l'enhavo de ambaŭ broŝuroj.

Kiel akiri ilin? Se vi jam estas abonanto de la broŝura serio kaj disponas pri sufiĉa kredito, vi ricevos ilin aŭtomate. -

Se vi estas abonanto de 'Laŭte' aldonu 70 FFR aŭ egalaŭtore, kiam vi reabonos al la gazeto. Kontraŭ 150 FFR vi ricevos 6 numerojn 'Laŭte', adresaro kaj la du broŝurojn de k-do,ROL

Se vi ne estas abonanto de 'Laŭte' vi povas aĉeti la broŝurojn per 90 FFR aŭ egalaŭtore (inkluzive afrikanco) pere de Libroservoj Führer aŭ Beau (Pri adresoj vidu paĝo 2 de tiu ĉi MAGAZINO) aŭ rekte de Cercle amical espérantiste, FR-47470 Beauville.

### Premio por vino

La vin-mazino 'Vinum' premiis 'Spätburgunder Trockenbeerenauslese' vinjaro 1994 de vinkultivistoj Oberkirch per la aspirata premio: Deutscher Rotweinpreis (germana premio por ruĝa vino).  
(el Mittelbadische Presse, 28.11.96)

#### Aperotaj/Impressum:

Eldonanto/Herausgeber:  
Libera Esperanto-Asocio an Germanio  
Freier Esperanto-Bund in Deutschland  
Renchener Str. 47, D-77704 Oberkirch  
Tel.: (0)7802 - 90 336

Resp./Verantw.: Albert Stephan (AFS)

Kunlaborantoj/Mitarbeiter:

Karl-Heinz Kersting, Essen (KHK)

Hans Rodawig, Hannover (H.R.)

Margot Stephan, Oberkirch (M.St.)

Okaza/gelegentlich:

Friedel Bues, Hannover,

Siegfried Linke, Halle;

Gary Mickie, Berlin;

Weitar Poppeck, Oberkirch.

Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj;

redakcio havas la rajton mallongigi aŭ

refuzi ensendojn. - Autoran sind für ihre

Artikel selbst verantwortlich. Die Redak-

tion behält sich das Recht vor, Einsendun-

gen zu kürzen oder abzulehnen.

MAGAZINO aperas/erscheint kvarfoje/

vier Male jare/J. Abonoprazo: 15,- DM

Memorokotizo antenas liveradon da la


bulteno/ der Mitgliedsbeitrag enthält die

Lieferung der Zeitschrift.

LEA/G-Konto: Sonderkonto Kersting

Nro: 416 210-432 Postbank Essen

(BLZ 360 100 43)



**Hero kaj Leander  
— ĉe la Lago de Konstanz**

Apud la nordokcidenta bordo de la Lago de Konstanz vid-al-vide al la iama kastelo Hohenfels staras sur kruta roko la ruina kastelo Kargegg. En ĝi vivis antaŭ multaj jaroj la mirbela filino de nobelo; ŝi nomiĝis Fortunata kaj sin donis en kaŝa amo al la kavaliro de Hohenfels. Ŝia patro oponante al tiu amo ordonis gardi ŝin severe tiel, ke la Hohenfels-ano povis viziti la fraŭlinon nur en mallumo de senstelaj noktoj. Tial la geamantoj ekuzis ruzojn. Unu ĉiuvespera kiam la belulino estis sola, ŝi starigis brulantan kandelon antaŭ sia fenestro; ĝi estu signalo kaj gvidlumo por la kavaliro. Tuj post kiam la Hohenfels-ano rimarkis ekbrileton de la lumo, li tranaĝis la lagon al sia amatino - kaj nur en matena krepusko li reiris samvoje. Longan tempon tiu nokta aventuro sukcesis. Sed kiam iunokte la aŭdaca junulo volis denove naĝi al Kargegg, enfalis sovaĝa ventego, kiu estingis la lumon kaj Hohenfels vane baraktis kontraŭ stormajn ondegojn. Li perdis siajn fortojn kaj dronis proksime al la kastelo en la furiozaj akvoj. Post kiam Fortunata asopire atendis lin, ŝi rapidis el sia ĉambro malsupren al la bordo, kie ĵus ondofrapo al-strandigis la mortintan karulon. Sian amon kaj fidelon ŝi kunportis en sian tombon.

Laŭ legendo ŝia fantomo ankoraŭ hantadas en la kastelaj ruinoj. Kaj tio, kiu li berigus ĝin, trovas la mirindajn trezorojn, kiuj kuŝas superŝutitaj en la ruina kastela volbaro, inter ili keglaro el pura oro

(Tradukis: Cis-Danuba Bando  
OOB Stockach-Messkirch 86)

**Nachklänge**

Hubert Weinzierl

Formato 19 x 21 cm  
Umfang 64 Seiten  
mit 27 Farbabbildern  
seilopanierte Buchdecke  
gebunden

Hubert Weinzierl

**NACHKLÄNGE**

Dieses sehr hübsch bebilderte und repräsentative Werk fordert jeden zum Durchblättern. Lesen und Nachdenken hegt. Mit manchmal geradezu sarkastischen Worten werden die Probleme in der Natur von heute und morgen angesprochen. Wohlthuend angenehm erfrischen die sorgfältig ausgesuchten farbigen Stimmungsbilder das Auge des Betrachters. Ein Buch, mit dem Sie sich und Ihren Freunden viel Freude machen — ein hervorragendes Geschenk für jedermann.

**RESONOJ**

Tiu ĉi belaranĝe ilustrita kaj reprezenta verko provokas ĉiun trafollumi, legi kaj enpenziĝi. Vortoj kalkfoje verdire sarkasmaj, evidentigas la problemojn en la naturo hodiaŭ kaj morgaŭ. Okulojn de la rigardanto freŝigas en plaĉe agrabila maniero la koloraj bildoj sorge elektitaj. Jen libro, pere de kiu vi povas igi multan ĝojon al vi kaj al viaj geamikoj — ekscelenta donacaĵo por ĉiu ajn.

Aĉetebla ĉe: Consuelo Führer,  
Am Stadtpfad 11, D-65760 Eschborn  
(Prezo 22,50 DM)

**Resonoj**

Hubert Weinzierl

Formato 19 x 21 cm  
Inhalt 64 paĝoj  
kun 27 koloraj bildoj  
seilopanierte Buchdecke  
gebunden

**Katolika meso en Esperanto**  
Lastan novembron aranĝis konata Pastro Eichkorn meson en la katedralo de Freiburg/Breisgau. Ĝus en ĉi tiu belega urbo scivoleme ni partoprenis la meson. La ĉarma pastro prezentis paroladojn, liturgion kaj kantadojn en la internacia lingvo. Li ege ĝojis, ke pli ol dudek esperantistoj partoprenis. Cetere: Pastro Eichkorn ofertis meso- k. kantadolibrojn por 3.- DM. (ĉeestis: ge-Stefanoj)

**Gotthold Ephraim LESSING (1729-1781)  
La parabolo pri la ringoj**

En temp' nememorebla, viro vivis en oriento: ringojn altvaloran de mano kara li posedis. - Ŝtono, opal' enestis centkolora, kiu sekretan forton havis; ĝi estigis agrabila antaŭ Di' kaj homoj ĉiun kun fido ĝin portantan. - Ne mirige, ke tial ĝin la vir' en oriento neniam metis for kaj testamentis, ke en la gento ĝi eterne restu. Do jene: li postlasis sian ringon al plej amata inter siaj filoj kaj testamentis: ankaŭ tiu lasu la ringon al la plej amata filo, kaj tiu posta ĉiam estu kapo kaj princ' de familio nur pro la ringo, ne laŭ leĝo de naskiĝo. La ringo venis do - de fil' al filo - al patro, fine, de tri filoj, kiuj egale ĉiuj estas obeemaj, kaj kiujn ĉiujn tri li povis nur egale ami... Kion far'?

Sekrete li artiston alvenigas kaj mendas laŭ model' de sia ringo aliajn du, kaj ne ŝparigas monon nek penon, por ke ili ja similu, similu nepre al la unu... Ĝoje li alvokas siajn filojn, ĉiun sola, al ĉiu sola donas sian benon - kaj ringon kaj formortas...

Tuj post la mort' de l' patro ĉiu filo alvenas kun la ring' kaj volas esti la princ' de l' familio. Esplor', disputo, plendado. Vane: ne montrebla estis la ring' malfalsa...

La filoj plendis, al juĝisto juris, ke ĉiu de la patro mem senpere ricevis sian ringon - kiel vere! ... „Kaj“, la juĝist' daŭrigis: „Jen la solvo! Ĉiu nun sen antaŭjuĝo pruvu la amon sian sen influiteco! Kaj ĉiu inner vi nun vetklopodu, elmontri l' forton de la ŝtono en la ringo, helpu al la forto per bonfaro, bonkoreco, pacemeco ...”

Tradukis: Karl MINOR (1891-1946)

**RADIO AUSTRIA INTERNACIA**


Ni estas en la mondo la voĉo de Aŭstrio. Ni disaŭdigas laŭ komisiio de federacia registaro kaj je kostoj de la federacio. Nia redakta sendependeco estas leĝe garantiita. Semajna komentario, raportoj, felietonoj, leterkesto, (dimanĉe: 04.30, 12.30; lundo: 01.30 UTC)

Nia programo ROI WIEN aŭskulteblas en Eŭropo ankaŭ per satelito ASTRA DIGITAL RADIO (ADR).

5945/49m, 6155/49m, 13730/22m

## Krucvortenigmo - Kreuzworträtsel

Facile solvebla per vortaro -  
leicht zu raten per Wörterbuch!




Horizontala -  
waagerecht

- 1: zerschmettern  
7: irren  
9: schön (adverbo)  
11: Hand  
13: man  
15: etwas  
17: lieben (verbo)  
18: Lastwagen \*  
21: Mensch  
22: Netz  
24: schmücken  
26: geben \* (verbo)  
28: sie (pronomo)  
30: klein  
32: Alge  
34: soviel  
36: zwischen  
37: Handlung  
38: unser(e)

\* ohne Endung

Vertikala -  
senkrecht

- 2: Schiene  
3: Ebene  
4: bewaffnen  
5: sein  
6: gehorschen  
8: Beweggrund  
10: Zeitabschnitt  
12: Name \*  
14: verneinen  
16: schnödes Geld  
17: Blutarmut  
19: Sitte \*  
20: golden  
21: Heute  
23: Linde  
25: notieren \*  
27: vielfach (Endg)  
29: einstig  
30: Ewigkeit  
31: Kauz \*  
33: leichtes Boot \*  
35: gehen



"Tio estas tre bona ideo. Per tia metodo oni povas plialtigi sian ŝtatan socialan subtenon. Helpas Theo Weigel ŝpari elspezojn."

Georges Brouel

## Pri franca vino



Oni plej honoras siajn amikojn kiam malkorki botelon el sia vinkelo. - Estas facila aranĝi malgrandan vinkelon, sufiĉas kelkaj antaŭzorgoj. La temperaturo en kelo estu eble ĉiam egala, ĉirkaŭ 12°C kaj ne tro malseka, ĉar malseko kaŭzas tineaĵn korkojn. Se vino flanke de korko elfluas, malkorku la botelon kaj trinku la vinon antaŭ ĝi korkogustas aŭ estos vinagriĝata. Boteloj

estu ĉiam kuŝataj. - Kiom da tempo oni konservu sian vinon? En la dua jaro oni povas konsumi ĝin, sed la plimulto de la vinkonsumantoj preferas vinon, kies aĝo estas inter 5 - 10 jaroj. - Blankaj vinoj kaj ĉampanoj estas surtabligataj en malvarma kondiĉo, ruĝaj vinoj havu la temperaturon de la manĝoĉambro kaj estu malkorkiĝataj unu horon antaŭ la servo.

Oni povas akompani kutiman manĝadon per unu sola vino (blanka aŭ ruĝa laŭ la manĝado) el la sama vinorigino ekz. CAHORS (kiu aĝas 2-3 jarojn) el la valo, dume ĉasado, rostajo, tiun el la montetoj (5-6 jaraĝas) kaj dum manĝado de fromaĝo (ankaŭ kapra fromaĝo) Cahors-vinon el la altebenajoj (8-10 jaraĝas). Oni certe primiros la 'fajron' de odoroj kaj gustoj. Kun konkvoj, fiŝoj, oni surtabligas sekajn blankajn vinon kaj kun kuko dolĉan blankan vinon aŭ dolĉan ĉampanon.

Ĝuu la vinon, sed ne forgesu, ke ĝi enhavas ofte 13% da alkoholo. Avertu al la aŭtomobilistoj!

**SOLIDARECO! NI alvokas la kamerad>in<ojn, kiuj ne povos partopreni la 70-an Kongreson de SAT (02.-09.08.1997 Augsburg)! OKK devas ordigi nestenditajn malfacilaĵojn, kiuj verŝajne dispelos la finanĉan kadron. >>> VI povas helpi per solidara donaco; jam 10 DM sufiĉas. Amike via LEA/G-prezidantaro >>>Konto: Hermann Schmid Sonderkonto Neusäss**